| Matthias Claudius, | Matthias Claudius, | Matthias Claudius, | Matthias Claudius, | Matthias Claudius, |
|---|---|---|---|---|
| **Abendlied** | **Vespera kanto** | **Vespera kanto** | **Vespera kanto** | **Vespera kanto** |
| | *tradukita de Otto Bonte* | *tradukita de Joachim Gießner* | *tradukita de Manfred Retzlaff* | *tradukita de Adolf Burkhardt* |
| 1. Der Mond ist aufgegangen, | 1. La luno jam leviĝis, | 1. La luno jam leviĝis, | 1. La luno nun leviĝis, | 1. Leviĝas luno; hele |
| Die goldnen Sternlein prangen | Steletoj ekheliĝis, | steletoj ekheliĝis, | La steloj eklumiĝis, | orpompas surĉiele |
| Am Himmel hell und klar; | Ravante homojn nin; | ravante homojn nin. | Subiĝis jam la sun'. | la steloj al l'okul'. |
| Der Wald steht schwarz und schweiget, | Silentas la arbaro | Silentas la arbaro | Silentas la arbaro | Arbaro mute revas; |
| Und aus den Wiesen steiget | Kaj super la kamparo | kaj super la kamparo | Kaj super la kamparo | el la herbej' sin levas |
| Der weisse Nebel wunderbar. | Nebulo pala levas sin. | nebulo pala levas sin. | Nebulo blanka kuŝas nun. | mirinde blanka la nebul' |
| Wie ist die Welt so stille | 2. Ho, mondo la kvieta, | 2. Neniu vento blovas, | 2. La mondo ŝajnas kiel | 2. Ripozas mont' kaj valo |
| Und in der Dämmrung Hülle | Kaj kiel ŝajnas eta | la mond' ne plu sin movas | Hejmeca ĉambro, tiel | sub la krepuskvualo |
| So traulich und so hold! | Krepuska en kovril'; | sub paca, klara lun'. | Trankvila estas ĝi. | trankvile kvazaŭ lag'. |
| Als eine stille Kammer, | Por ke vi en ĉambreto | Nun petu noktan benon, | Dormante ĉiun penon, | Por vi jen la permeso |
| Wo ihr des Tages Jammer | Samkiel infaneto | de l'tago la ĉagrenon | Aflikton kaj ĉagrenon | fordormi en forgeso |
| Verschlafen und vergessen sollt. | Senzorge dormu en lulil'. | dormantaj vi forgesu nun. | Dum nokta hor' forgesu vi.[3] | la malbonaĵojn de la tag'. |
| . . . | . . . | . . . | . . . | . . . |

[3] alia versio:
2.) Aĥ, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,
Forgesu la aflikton vi!

http://www.poezio.net/version?poem-id=394&version-id=776,779,782,777,780

